# ENHAVO


**NEMERE, LA PROFESIULO**
Eugene de ZILAH . . . . . . . . . . . . . . 4
**EL VIAJ LETEROJ...**
Jiři PATERA, KURISU Kei
Peter BROWNE, Christian DECLERCK. 8
**SUR INSULO DEZERTA...**
Lina GABRIELLI . . . . . . . . . . . . . . . 11
**MONUMENTO POR ADOLF MILDWURF**
Ed BORSBOOM . . . . . . . . . . . . . . . 12
**PROVERBO-ĈIFRO 'PĈ-122'**
Nora CARAGEA . . . . . . . . . . . . . . . 13
**INFERO**
KURISU Kei . . . . . . . . . . . . . . . . . 14
**ŜAKPROBLEMO 'ŜPB-122'**
PASKALO . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 17
**KONCIZE KAJ HEREZE**
*Historio de Esperanto*
de Aleksander KORĴENKOV
recenzo: YAMASAKI Seikô . . . . . . . 18
**WARINGHIEN, PLURLINGVA POETO**
*Alilingvaj erotikaj poeziaĵoj*
recenzo: Adriaan DEN HAAN . . . . . 19
**GEMO RIKOLTA, TEMO ADOLTA**
*Alilingvaj erotikaj poeziaĵoj*
recenzo: HU Guozhu . . . . . . . . . . 20
**CHERPILLOD PRAVAS**
*L' espéranto, une valeur culturelle – L' espéranto une valeur pédagogique*
de André CHERPILLOD
recenzo: Michel CLÉMENT . . . . . . . 22
**"INFANTRAVIVAĴOJ"**
de Armelle LEQUINT
recenzo: EdZ . . . . . . . . . . . . . . . . 23
**DEBATOJ**
Janpetro KAVLAN, Bert BOON. . . . . . 23
**"POVIS CERTE OKAZI PLIMALBONE"**
A.P. PIRANDELLO tra Lina GABRIELLI 24
**LA BLANKA SKLAVINO**
Daniel GALERA
tra Luiz PORTELLA . . . . . . . . . . . . 25
**DANCANTA SAĜECO**
Hussain AL-AMILY. . . . . . . . . . . . . 28
**ĈU VI JAM SCIAS...?** . . . . . . . . . . 29
**LA SCIURO**
Raymond GUEGUEN . . . . . . . . . . . 31


# Trevor STEELE aperis la dua volumo de "La Fotoalbumo"


**numero 122** **2a de la 21a jaro** **31jan06**

*Karaj Amikoj,*

Tiu ĉi numero estas aparte kaj plurkiale prifierinda. Unue, ĉar finfine ankaŭ Latin-Ameriko aperas en *LG*, tra novelo de brazila verkisto tradukita de Luiz PORTELLA. Bonvenon al la nova kunlaboranto !

Due, ĉar PASKALO, nia malnova ŝakisto, reaperis ; lia lasta kontribuo estis en junio 2001. Kaj jen li proponas nekutiman problemon, kiu espereble ne perpleksigos niajn ŝakamantojn.

Trie, ĉifoje virino decidis vojaĝi al dezerta insulo : Lina GABRIELLI… por ripozi kaj sin distri. Ŝi krome nutras per traduko la rubrikon *Ni ridetu,* delonge neglektitan.

Kvare : *Krom-KancerKliniko* de 2003 ĝis nun ne provokis reagon, kvankam tuj je l' apero Adriaan DEN HAAN proponis recenzi ĝin. Surprize, je 15dec05, lia recenzo estis en la retkesto…! Surprize, la 21an, samloke kuŝis medito de HU Guozhu, al kiu iun tagon mi sendis, nur por lia ĝuo, mian ekzempleron. Du rigardoj ofte utilas.

Kvine : KURISU Kei, instigite de pluraj artikoloj, sendis tiom riĉampleksan leteron, ke mi uzis fragmenton kiel memstaran artikolon (*Infero,* p. 14).

*Madeleine de Zilah*